

# informilo por interlingvistoj

## ipi

26-a jaro (tria serio) | n-ro 101 (2/2017) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)  
kaj Esperantic Studies Foundation

---

## Enhavo

1	Antaŭparolo .....	2
2	Simpozio memorigis ke malatento al lingvaj diferencoj obstaklas la Celojn por Daŭripova Evoluigo .	2
3	Estontaj Konferencoj kaj aliaj aranĝoj .....	4
4	Esperantic Studies Foundation kaj la Universitato de Kostariko anoncis someran seminarion pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko .....	5
5	Peto pri referaĵoj .....	7
6	Brita Asocio pri Aplika Lingvistiko fondis fakgrupon pri lingvopolitiko .....	7
7	Nova Prezidanto ĉe la Centro de Aplika Lingvistiko .....	8
8	Finiĝis la 6-a Tutmonda Ekzameno pri Esperanto kaj komenciĝos serio de unuopaj sesioj .....	8
9	Forpasis André Albault (1923-2017) .....	9
10	Lastatempaj Publikigaĵoj .....	9
	Libroj .....	9
	Artikoloj .....	10
11	Language Problems and Language Planning 41:1 and 41:2 (2017) .....	10
	LPLP 41:1 Table of Contents (expected July 2017) .....	10
	LPLP 41:2 Table of Contents (expected August 2017) .....	10
12	Esperantic Studies Foundation nomis novan Ĉefdirektoron .....	11
13	Londona konferenco diskutis la ekaperon de lingvopolitiko de Unuiĝintaj Nacioj .....	12
14	Interlingvistikaj Studoj en Poznano akceptas aliĝojn por 2017-2020 .....	13

## 1 Antaŭparolo

La centa numero de *Informilo por Interlingvistoj (IPI)* konsistis el detala indekso de la antaŭaj 99 numeroj, tiel donante kompletan bildon de la longega kaj tre efika redaktorado de nia bedaŭrata Detlev Blanke, la fidela redaktoro de *IPI*, kiu forpasis en aŭgusto 2016. La plej lastaj numeroj de *IPI* (75 kaj poste) troviĝas plentekste en arkivo en la retejo de ESF ([www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/](http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/)). Ni esperas, ke baldaŭ ni kolektos la mankantajn numerojn kaj aldonos ilin. Per la nuna 101-a numero ni komencas novan epokon.

La kvalito de la estonta *IPI* grandparte dependos de la alfluo de informoj. Bonvolu do informi nin pri viaj estontaj aranĝoj, viaj publikigaĵoj (kaj tiuj de aliaj), viaj aliaj novaĵoj pri la interlingvistika agado, ktp. Konsciu, ke temas pri informILO – simpla ilo por helpi vin fari vian laboron pli efike – ne pri plene redaktata gazeto. Sekve, plene elformulitaj kaj redaktitaj informoj, kiujn ni povos simple transpreni kaj enmeti en la venontan numeron, estas idealaj. Sendu ilin al [ipi@esperantic.org](mailto:ipi@esperantic.org).

Ni samtempe lanĉas anglalingvan bultenon, *Information for Interlinguists*, kiu principe enhavos samajn informojn kiel la Esperanta versio. Sekve, ni bonvenigos informojn ankaŭ en la angla – aŭ, eĉ pli bone, en unu lingvo kun traduko en la alian. Kaj bonvolu ne plendi, ke produktante anglalingvan informilon ni iel lakeiĝas al anglalingva imperiismo! Nia intenco kiel ESF estas atentigi la anglalingvajn fakulojn pri la riĉaĵoj de la esperantlingva interlingvistika mondo, ne inverse.

Humphrey Tonkin

## 2 Simpozio memorigis ke malatento al lingvaj diferencoj obstaklas la Celojn por Daŭripova Evoluigo

La Celoj de UN por Daŭripova Evoluigo (CDE) estas mankaj rilate al atento al lingvaj demandoj, ĉefe pro ĝenerala malatento al la konsekvencoj, pozitivaj kaj negativaj, de lingva diverseco. Tiel asertis la Provizoraj Konkludoj de simpozio organizita de la Studo-Grupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, kun subteno de Universala Esperanto-Asocio kaj aliaj organizaĵoj.

Pli ol cent universitatanoj, diplomatoj, UN-oficistoj kaj reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj (NROj) ĉeestis la simpozion ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, la 11-an kaj 12-an de majo. Ĝia celo estis ekzameni demandojn pri lingvoj kaj vundeblaj homgrupoj kaj ilia centreco en la disvolvo, realigo kaj sukcesa kompletigo de la CDE.

La simpoziaj ĉefparolantoj estis Christine Hélot, de la Universitato de Strasburgo, Francio, kaj François Grin, de la Universitato de Ĝenevo, Svislando, kaj referaĵojn prezentis fakuloj el dekduo da pliaj landoj. La simpozion malfermis podia diskuto inter reprezentantoj de la diplomatia korpuso, UN-oficistoj, NROj kaj la universitata medio: Ambasadoro Michael Ten Pow, Konstanta Reprezentanto de Gujano ĉe UN, Carole Maisonneuve, Kunordiganto de Publika Informado kaj Multlingvismo en la Fakoj de UN pri Ĝeneral-

assemblea kaj Konferenca Mastrumado, Christina Diez de ATD Kvaramonda Movado, kaj Humphrey Tonkin, emerita prezidanto de la Universitato de Hartford, Usono.

La referantoj, multaj el kiuj estis specialistoj kiuj dediĉas sian profesion vivon al komprenado de la rolo de la lingvo en la socio, ekzamenis individuajn komunumojn, evoluigajn projektojn kaj plej bonajn praktikojn. Ili substrekiis la esencan rolon kiun ludas lingvoj en faciligo aŭ obstaklado de daŭrigebla evoluigo, precipe rilate al vundeblaj homgrupoj, esence heterogena grupo de unuavicaj interesohavantoj en atingado de la CDE. Tri specoj de vundeblaj homgrupoj konsistigis la fokuson de la simpozio: konstante setlintaj rifuĝintoj/enmigrintoj, portempe setlintaj rifuĝintoj/enmigrintoj, kaj indiĝenaj aŭ lingvoheredaj lingvaj minoritatoj. Ene de tiuj tri grupoj, plenaĝuloj kaj infanoj montriĝis sperti signife malsamajn lingvorilatajn defiojn.

La simpozion aŭspiciis pluraj organizaĵoj, inkluzive de Universala Esperanto-Asocio (organizaĵo en konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN kaj kunlaboranta kun la Fako de UN pri Publika Informado), Centro por Aplika Lingvistiko (CAL), Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj ties revuo *Language Problems and Language Planning*, kaj Esperantic Studies Foundation (ESF). Subvenciis CAL kaj ESF. Lokaj esperantistoj kiuj helpis en la organizado inkluzivis Ulrich Becker, Michael Brandini, Raul Garcia, Sofiya Soskina, kaj Allison Thorsen. Fina simpozia raporto aperos baldaŭ.

Prezentiĝis la jenaj referaĵoj:

- **Christine Hélot, University of Strasbourg, France.** *Analysing the sustainability of linguistic diversity across the home and school contexts*
- **François Grin (University of Geneva, Switzerland).** *Sociolinguistics and economics: Reassessing an ongoing dialogue*
- **Carol Benson & Kelsey Woodrick (Teachers College, Columbia University, New York, USA).** *Roles played by UNESCO and UNICEF in supporting multilingual education for vulnerable populations*
- **Julia Szelivanov (Eötvös Loránd University, Budapest, Hungary).** *UNESCO and its efforts to preserve multilingualism in the light of contemporary theories of language policy*
- **Wine Tesseur (University of Reading, UK).** *Listening in what language? The role of languages in international NGOs' development programmes*
- **Ana Lado (Marymount University, USA) & Fakhira Najib (Islamabad, Pakistan).** *Sustainable success in Pakistan: Broad Class Interactive Radio Instruction*
- **Kurt E. Müller (National Defense University, Washington DC, USA).** *Access to non-state languages for interacting with vulnerable populations*
- **Jean-Paul Dailly (JPD Systems).** *Participation and governance in French-speaking Africa: Is the role of language in fostering knowledge sharing underestimated by international development actors?*
- **Cornelius Wambi Gulere (teacher and development worker).** *Cultures that use indirect language today face the challenge of being misunderstood*
- **Francis M. Hult (Lund University, Sweden).** *Linguistic landscapes and sustainable cities for vulnerable populations*
- **Corrie Blankenbeckler (Creative Associates International).** *Reading from the Heart: Expanding the bilingual education experiment in Mozambique*

- **Ari Sherris (Texas A&M University-Kingsville, USA) & Paul Schaefer (SIL).** *Lessons learned from Ghanaian Safaliba literacy activists: Theorizing expanded literacy opportunities in unrecognized mother-tongues*
- **Fernanda Minuz (SAIS Europe, Bologna), Lorenzo Rocca (Università per Stranieri, Perugia) & Alessandro Borri (CPIA Montagna, Italy).** *Teaching L2 to non-literate and low-literate adult migrants in Europe*
- **Alexander Braddell & Matilde Grünhage-Monetti (Language for Work Network, European Center for Modern Languages, Graz, Austria).** *New initiatives in Europe to support work-related language learning by low-skilled migrants: lessons for policy and practice*
- **Shereen Bhalla & Terrence Wiley (Center for Applied Linguistics, Washington, USA).** *Reducing inequality and discitizenship within the multilingual United States*
- **William Savage (organizational and community development facilitator).** *Facilitated Advocacy: Connecting people through dialogue and action*
- **Anne Wiseman (British Council, UK).** *Language for Resilience: A framework for language and sustainability for vulnerable populations*
- **Jan Stewart (University of Winnipeg) & Thomas Ricento (University of Calgary, Canada).** *Refugee student integration in Canada: Building welcoming communities and schools for a stable future*
- **Belma Hazndar (Boğaziçi University, Istanbul, Turkey), Joy Kreeft Peyton (Center for Applied Linguistics, Washington, DC, USA), Martha Young-Scholten (Newcastle University, UK).** *Teaching refugee and immigrant adults: A focus on their languages*
- **May Akl (Notre Dame University, Lebanon).** *A reality check on language and education for Syrian refugees in Lebanon: Issues and challenges*
- **Eunice Kua (SIL International) & Mubarak Baraka Ismail.** *Mother language as a powerful motivator for refugee education*
- **Rosemary Salomone (St. John's University, New York, USA).** *Global English, vulnerable populations, and educational access: Lessons from the courts in three countries*
- **John Knagg (British Council, UK).** *Respecting linguistic diversity and promoting English. Is it possible to do both?*
- **Michel DeGraff (Massachusetts Institute of Technology, Cambridge, MA, USA).** *Language, education, human rights, equal opportunity & sustainable development: Haiti as a case study*

### 3 Estontaj Konferencoj kaj aliaj aranĝoj

*UK Language Policy after Brexit 2017: The influence of devolution*

**21 septembro 2017**, Aberystwyth University, Britio. Konferenca lingvo: angla.

<https://sites.google.com/view/uklpab/2017>

*Symposium on the Politics of Language Policy at the Local Level*

**22 septembro 2017**, SOAS University of London, Britio. Konferenca lingvo: angla

Limdato por proponoj: **vendredo 14 julio 2017**

Pliaj informoj: <https://www.soas.ac.uk/linguistics/events/22sep2017-symposium-on-the-politics-of->

[language-policy-at-the-local-level.html](http://www.esperanto.org/lingua-policy-at-the-local-level.html)

*International Colloquium "Language Skills for Economic and Social Inclusion"*

*Internacia Kolokvo "Lingvaj kapabloj por ekonomia kaj socia inkluzivo"*

**12-13 oktobro 2017**, Humboldt-Universität zu Berlin, Germanio

[https://www.projekte.hu-berlin.de/en/okonomie-und-sprache/conferences/upcoming?set\\_language=en](https://www.projekte.hu-berlin.de/en/okonomie-und-sprache/conferences/upcoming?set_language=en)


Konferencaj lingvoj: Referaĵojn oni akceptos en angla, Esperanto, franca, germana, hispana, itala, sveda.

*Summer School on Linguistic Policy, Linguistic Planning and Evaluation (LPLPE17)*

**31 July - August 4 2017**, University of Costa Rica, San José, Costa Rica

<http://inil.ucr.ac.cr/lplpe17-en/> Vidu la ĉi-suban anoncon.

## 4 Esperantic Studies Foundation kaj la Universitato de Kostariko anoncis someran seminarion pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko



La Instituto pri Lingvoesplorado (INIL) de Universidad de Costa Rica, kune kun Esperantic Studies Foundation ([www.esperanto.org](http://www.esperanto.org)), invitas al **Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado (LPLPE17)**, kies celo estas malfermi internacian spacon por diskutoj kaj dialogo pri Lingvopolitiko kaj Planlingvistiko.

Latinameriko estas multkultura kaj multlingva regiono, kondiĉoj ankaŭ karakterizantaj Kostarikon, kiu sendube multe gajnas kulture kaj demokratie, se ĝi rekonus tiun diversecon je ĉiuj oficialaj nivelo. Alfronti aferojn pri politik- kaj lingvoplanado estas grave; ĉefe se oni konsideras ke la tradicia vidpunkto, kiu emas forgesi aliajn kulturojn kaj lingvojn (kiuj ankaŭ konsistigas identecon de la lando) estas fonto de miskomprenoj kaj konfliktoj. Tial gravas trovi spacon, en kiu oni povos kundividi spertojn, kies naciaj kaj internaciaj problemoj estos postulitaj, tiel ke oni povu analizi kaj proponi solvojn ekde la vidpunkto de la diverseco kaj respekto de homaj rajtoj.

La nuna seminario proponas spacon por dialogo kaj diskuto, kie ĉiaj problemoj, kaj naciaj, kaj internaciaj, estu starigataj kun la celo analizi problemojn kaj proponi solvojn nome de la diverseco. Aliflanke, la politika lingvistiko kaj la lingvoplanado estas kreskantaj interfakoj, dank' al pligrandiganta konscio pri la graveco de lingvopolitiko kaj lingvoplanado en edukado, publika administrado kaj ekonomio. La lingvopolitiko povas influi rezultojn de studentoj kaj labormerkato, same kiel la partoprenon de civitanoj en demokrataj decid-procedoj kaj konkurenca kapablon por firmaoj. Do ĝi estas studkampo bezonanta kontribuojn el diversaj fakoj. Kvankam lingvoplanado estis tradicie parto de sociolingvistiko, hodiaŭ ĝi emas iĝi interfako en kiu kunfluas fakuloj el sociolingvistiko, politikaj sciencoj, ekonomiko kaj filozofio. Jen kial ni proponas tiun ĉi seminarion, kiu okazos por la unua fojo en Latinameriko.

La seminarion konsistigos la priskribo kaj analizo de la fundamentaj konceptoj pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Lingvopolitiko-Taksado, samkiel pri iliaj celoj kaj metodoj. Dum la kvar sesioj de la seminario, la prelegantoj raportos pri kazoj de ili esploritaj. Tri el tiuj sesioj efektiviĝos anglalingve kaj unu hispanlingve. Samtempe okazos serio da prelegoj koncerne la seminari-temaron.

La seminario daŭros unu semajnon; entute temas pri 20 horoj en kvar tagoj (mekredo, la 2-a de aŭgusto, estas nacia ferio). LPLPE17 celas allogi studentojn kun superaj studoj (licencio, magistrecio, doktoreco) el diversaj landoj, al kiuj oni proponos ĝisdatigitan trejnadon pri teorio, metodologio kaj praktikaj fundamentoj de Politika Lingvistiko, Planlingvistiko kaj Politiktaksado. Tio ankaŭ signifos spacon por kunveni, interkomunikiĝi kaj interŝanĝi ideojn inter esploristoj okupiĝantaj pri LPLPE.

#### La seminario konsistos el kvar partoj:

- **Lingvaj Politiko kaj Planado (LPP).** Historio, celoj kaj rezultoj de LPP. Prelego de D-ro. David Cassels Johnson, University of Iowa (“Language Policy and Planning: Theory, Methods and Findings”)
- **Taksado de Lingvaj Politiko.** Kiel identigi la efikecon de LPP kaj kiel taksigi ĝin en socia kaj ekonomia vivo. Prelego de D-ro. Michele Gazzola, Humboldt-Universität zu Berlin (“Evaluation in Language Policy and Planning (LPP)”)
- **Interlingvistiko kiel ekstrema lingvoplanado: kategorioj kaj kazoj.** Interlingvistiko studas homajn rilatojn pere de planglingvoj kaj malegalecon inter lingvoj, do, Lingvan Justecon. Prelego de Dr. Federico Gobbo, University of Amsterdam (“Interlinguistics as extreme language planning: categories and cases”).
- **Problemoj de lingvoplanado en lingvoj en situacio de delokigado.** Prelego de D-ro. Carlos Sánchez Avendaño, Universidad de Costa Rica (“Problemas de la planificación en lenguas en proceso de desplazamiento”).

#### Akademia profilo de la prelegantoj:

- David Cassels Johnson (<https://education.uiowa.edu/person/david-cassels-johnson>), University of Iowa, USA. Profesoro de LPP, publikigisto de libro *Research Methods in Language Policy and Planning: A Practical Guide*, kun Hult, F., 2015: Malden, MA: Wiley-Blackwell, kaj aŭtoro de *Language Policy*, 2013, Basingstoke, UK: Palgrave Macmillan.
- Michele Gazzola ([www.michelegazzola.com](http://www.michelegazzola.com)), Humboldt-Universität zu Berlin (Germanio), University of Lugano (Svisio), kaj Institute of Ethnic Studies en Ljubljana (Slovenio), esploristo pri ekonomika lingvo kaj lingvopolitiko taksado. Editoro de libro *The Economics of Language Policy*, kun B. A. Wickström, 2016, Cambridge (MA) MIT Press, kaj aŭtoro de *The Evaluation of Language Regimes*, 2014, Amsterdam: John Benjamins.
- Dr. Federico Gobbo (<http://federicogobbo.name>), University of Amsterdam, Nederlando kaj University of Turin, Italio. Profesoro de Interlingvistiko kaj Esperantologio, aŭtoro de la libro *Constructive Adpositional Grammars: Foundations of Constructive Linguistics*, 2011, Cambridge: Cambridge Scholars Publishing, kaj la artiklo: “Are planned languages less complex than natural languages?” Ene de *Language Sciences*, 2016
- Dr. Carlos Sánchez Avendaño (<http://filologia.ucr.ac.cr/sites/default/files/cvs/lin15.pdf>), Universidad de Costa Rica. Profesoro de Lingvistiko kaj fakulo pri Lingvistika Revivigo. Aŭtoro de la libro *La vosto de la igvano: La gento Maleku antaŭ la deloko de sia lingvo kaj tradicia kulturo* 2015, Costa Rica: Editorial Universidad de Costa Rica, kaj la artiklo “Leksika rekonstruo kaj morfoleksika variebleco de lingvo tre delokita : La kazo de la vortaro pri la homa korpo en la lingvo de broran’ (térriba, hispanlingve, N. de la T.)”, en *Estudios de Lingüística Chibcha*, 2015.

Laborlingvoj estos la hispana kaj la angla. La aktoj estos aperigitaj en la revuo *Kañina*, Revista de Artes y Letras de la Universidad de Costa Rica (<http://revistas.ucr.ac.cr/index.php/kanina>).

#### Organizantoj:

Kunordigantoj: D-ro. Jorge Antonio Leoni de León, D-ro. Michele Gazzola

Asistantino: Bach. Yislén Barboza Hidalgo

Kunorganizantaj geesploristoj: M.Sc. Hugo Mora Poltronieri, M.L. Erica Vargas Castro, Lcda. Daniela Sánchez Sánchez

Tiu ĉi seminario estas registrita en Universidad de Costa Rica, ĉe Vicerrectoría de Investigación, kodo 745-B7727, kaj ĉe Vicerrectoría de Acción Social, kodo ED-3256. Ĝi estas subtenita de Instituto de Investigaciones Lingüísticas (INIL), Vicerrectoría de Investigación (<http://www.vinv.ucr.ac.cr/>), Posgrado de Lingüística (<http://www.linguistica.ucr.ac.cr/>), Sistema de Estudios de Posgrado (SEP), <http://www.sep.ucr.ac.cr/>) kaj Esperantic Studies Foundation (ESF)

Datoj: **De la 31-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, 2017**

Daŭro: 4 tagojn (20 horojn entute).

Diplomo: Partopreno aŭ ĉeesto, laŭ situacio.

Kosto de LPLPE17: \$100 USD, ĝenerala publiko

## 5 Peto pri referaĵoj

Bonvenas resumoj (en la angla lingvo) de proponataj referaĵoj por kolokvo **“Impacts in Language Research: Crossing the Border from Research to Wellbeing”**, ĉe Socilingvistika Simpozio 22 (<https://www.ss22.ac.nz>, Konferenca fadeno: Lingvo kaj komunumo). Kunorganizantoj: Jo Angouri (University of Warwick), Karen Corrigan (Newcastle University), Robert Lawson (Birmingham City University), Dave Sayers (Sheffield Hallam University & Cardiff University). La celo de la kolokvo estas elstarigi socilingvistikajn esplorojn kiuj (1) Identigis problemojn de homa bonfarto; (2) Evoluigis esplormetodojn kiuj proponas solvojn kaj vojojn por transdoni la eltrovojn; (3) Atingis pozitivajn rezultojn ene de la reala mondo. **Limdato: vendredo, la 14-a de julio 2017.**

Resumojn sendu al: <https://goo.gl/forms/OOlaLuhbEN4tdDMq1>

## 6 Brita Asocio pri Aplika Lingvistiko fondis fakgrupon pri lingvopolitiko

Nova fakgrupo pri lingvopolitiko fondiĝis en British Association of Applied Linguistics (BAAL). La grupo interesiĝas pri lingvopolitiko tutmonde kaj planas gastigi retajn kaj eksterretajn seminariojn. Inaŭgura aranĝo okazos ĉe University of Leeds, la 2-an de septembro 2017, fine de la ĉi-jara BAAL-konferenco. Intertempe ĝia retlisto rolos kiel ĉiutaga diskutforumo por ĉiuj lingvopolitikaj demandoj. Ĉiuj partoprenantoj bonvenas. Membreco estas senpaga, kaj ne necesas esti BAAL-ano (kvankam ni instigas ĉiun personon aliĝi!). Aliĝante al la grupo, vi aŭtomate registriĝos en la retlisto kaj ricevos ĉiujn invitojn al aranĝoj. Detalojn vi trovos ĉe <https://sites.google.com/view/langpol/>. Klaku ĉe ‘Join!’ (supre) por aliĝi.

## 7 Nova Prezidanto ĉe la Centro de Aplika Lingvistiko

La estraro de la Centro de Aplika Lingvistiko (Center for Applied Linguistics: CAL) en Vaŝingtono anoncas la elektojn de d-ro Joel Gómez kiel la nova prezidanto de CAL. D-ro Gómez sekvas d-ron Terrence G. Wiley kiu eksiĝis la 1-an de majo post pli ol ses jaroj kiel prezidanto.

Ĝis sia aliĝo al CAL, d-ro Gómez estis profesoro kaj fakestro de la Fakultato pri Eduka Gvidado ĉe The George Washington University (GW), kie li ankaŭ rolis kiel vicdekano pri esplorado en la Fakultato pri Edukado. Li estas specialisto interalie pri dulingva kaj dukultura edukado, supera edukado, naciaj retaj informcentroj, kaj registara subteno de edukaj esploroj kaj evoluigo. Li laboris internacie kiel taksanto kaj liveranto de teknika helpo en pluraj landoj, interalie Barato, Pakistano, Makedonio kaj Dominika Respubliko. Kiel administranto poviga kaj motiviga, li alportas al CAL vastajn spertojn el supera edukado, la privata profitcela sektoro, kaj publika klerigado. Pliaj informoj: [www.cal.org/who-we-are/staff-associates/staff-directory/joel-gomez](http://www.cal.org/who-we-are/staff-associates/staff-directory/joel-gomez)

## 8 Finiĝis la 6-a Tutmonda Ekzameno pri Esperanto kaj komenciĝis serio de unuopaj sesioj

Ĉi-jare la unua kaj plej grava aranĝo de la Esperanto-ekzamenoj de UEA-ORIGÓ, organizitaj laŭ la Komuna Europa Referencadro (KER), okazis la 10-an kaj la 17-an de junio 2017. Kadre de la tiel nomata Tutmonda Ekzamentago 117 personoj ekzameniĝis en 18 lokoj de 14 landoj, sur tri kontinentoj. La paralelaj ekzamenoj estis aranĝitaj en tri blokoj. Ĝi estis la unua por la sin anoncintaj urboj en la eŭropaj landoj: Britio, Francio kun tri urboj, Germanio, Hispanio, Nederlando, Ruslando, Serbio, Svedio, Svislando, kaj Ĉinio kun du urboj. La saman tagon, kelkajn horojn pli malfrue, paralelaj ekzamenoj okazis en Usono, Kolombio kaj en du urboj de Brazilo. En la tria bloko, la 17-an de junio, en Japanio okazis KER-sesio.

Danke al la tekniko, la ekzamenojn eblas trapasi ne nur skribe. La parolajn partojn oni aranĝas pere de Skajpo, kunligante la kandidatojn en la ekzamenloko kaj la po du ekzamenantojn aliloke.

Jam preskaŭ ĉiuj testoj atingis Hungarion, kie post la korektado kaj taksado de la laboraĵoj oni pretigos la kvarlingvajn atestilojn por la sukcesintoj. La plimulto el tiuj estos transdonitaj en la ekzamentago dum la kongreso en Seulo. Tiu tago estos speciale grava en la KER-historio, ĉar verŝajne tiam ni ekhavigos nian 2000-an KER-diplomoton.

Entute ĝis nun en 87 urboj de 32 landoj okazis ekzamenoj, kaj la kandidatoj devenis el 70 landoj. La ĉampiono el inter la landoj estas Francio, kun pli ol 500 sukcesintoj.

La KER-ekzamenojn kunordigas la Ekzamena Komisiono de UEA, kaj en la praktiko organizas ilin Katalin Kováts, helpata de la teknika fono de la retejo edukado.net, kies redaktoro ŝi estas. Kompreneble la tuta laboro ne povus okazi sen ŝiaj rektaj kunekzamenantaj kolegoj, nek sen la plurdekoj da lokaj organizantoj kaj helpantoj. UEA dankas ĉiujn kontribuintojn pro ilia engaĝiĝo.



## 9 Forpasis André Albault (1923-2017)

André Albault forpasis la 17-an de majo en Tuluzo (Francio). Li naskiĝis la 14-an de majo 1923 en Reims, kie li lernis Esperanton en 1939. En 1950 li gajnis en la unua Oratora Konkurso en la 35-a UK en Parizo.

Profesie okulkuracisto, li estis plej konata pro sia rolo en la Akademio de Esperanto, kie li estis unue sekretario (1963), poste direktoro de la sekcio pri komuna vortaro (1965-1976) kaj fine prezidanto (1983-1995). Kiel prezidanto li fondis kun J. Thierry la asocion Amikoj de la Akademio, kiu eldonis la bultenon *La Letero de l' Akademio*. Krome li estis vicprezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio (1974-1976) kaj prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (1967-1974). En UEA li estis komitatano (1957-1969) kaj estrarano pri kulturo kaj faka agado (1962-1967).

Li redaktis la revuojn *Internacia Pedagogia Revuo* (1958-1959) kaj *Monda Kulturo* (1964-1966). Albault kunlaboris por Plena Ilustrita Vortaro pri medicinaj terminoj kaj la reviziado de la tuta vortaro. Li publikigis multe da artikoloj, enkondukis kaj prinitis la 9-an eldonon de *Fundamento de Esperanto* (1963) kaj verkis i.a. la sekvajn verkojn: *Vortaro franca-esperanto* (1961; kun R. Léger), *Naŭ prelegoj pri la Fundamento* (1990), *Vojaĝo tra la landoj kaj Multlingva glosaro pri la landnomoj* (1991). Luj el liaj landnomaj ideoj estis disputataj, same kiel tiuj pri la t.n. help-alfabeto priskribita en *Tri pri la tria* (2001; kun J. Doublet). En lia esperantigo aperis i.a. *La preĝado de A. Carrel* (1995) kaj *La prodiga povo de la Mond-Civitanoj de O. d'Argenlieu* (2012).

En la 83-a UK en Montpeliero en 1998 Albault estis elektita kiel Honora Membro de UEA. "De kiam mi estis 16-jara, mi dediĉis mian tutan vivon al Esperanto", li tiam skribis al UEA. Esperanton li transdonis ankaŭ al siaj tri infanoj, denaskaj esperantistoj.

## 10 Lastatempaj Publikigaĵoj

### Libroj

Esther Schor. 2016. [\*Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language\*](#). New York: Metropolitan Books, Henry Holt.

Ulrich Lins. 2016. [\*Dangerous Language: Esperanto under Hitler and Stalin: 1\*](#). Trans. Humphrey Tonkin. London: Palgrave Macmillan. xviii + 299pp. English translation of part 1 of Ulrich Lins, *La danĝera lingvo* (2016).

Ulrich Lins. 2017. [\*Dangerous Language: Esperanto and the Decline of Stalinism\*](#). Trans. Humphrey Tonkin. London: Palgrave Macmillan. xix + 198pp. English translation of part 2 of Ulrich Lins, *La danĝera lingvo* (2016).

## Artikoloj

Humphrey Tonkin. 2017. Naturalizing a Planned Language: Esperanto and the Promotion of Linguistic Diversity. In Maryam Borjian, ed. [\*Language and Globalization: An Autoethnographic Approach\*](#). New York & London: Routledge. 144-157.

## 11 Language Problems and Language Planning 41:1 and 41:2 (2017)

[LPLP 41:1 Enhavo](#) (aperos en julio 2017)

### Artikoloj

[English in Pakistani public education: Past, present, and future](#)

Liaquat Ali Channa

[Language shift or maintenance: The case of the Sindhi language in Pakistan](#)

Marya Khemlani David, Mumtaz Ali and Gul Muhammad Baloch

[State contestations in constructions of Malaysia: Saying it different to different people](#)

Mary Varghese and Kamila Ghazali

[Ethnolinguistic dilemma and static maintenance syndrome: A study of language policies and language perceptions in Pakistan](#)

Syed Abdul Manan, Maya Khemlani David and Francisco Perlas Dumanig

[LPLP 41:2 Enhavo](#) (aperos en aŭgusto 2017)

### Artikoloj

[Language rights in the constitutions, organic acts, and statutes of the territories of the United States and the Freely Associated States](#)

Eduardo D. Faingold

[Compulsory African language learning at a South African university: An exploration of macro- and micro dynamics](#)

Stephanie Rudwick

[Buttering their bread on both sides?: The recognition of sign languages and the aspirations of deaf communities](#)

Maartje De Meulder and Joseph J. Murray

[Linguistic capital: Language medium of instruction policy in Hong Kong](#)

Chris Harwood and Conttia Lai

## [Esperanto linguistics: State of the art](#)

Asya Pereltsvaig

### Recenzoj

[Review of Delabastita, Dirk & Ton Hoenselaars, Eds. \(2015\) \*Multilingualism in the drama of Shakespeare and his contemporaries\*](#)

Reviewed by Humphrey Tonkin

[Review of Ordóñez-López, Pilar & Nuria Edo-Marzá, Eds. \(2016\) \*Medical discourse in professional, academic and popular settings\*](#)

Reviewed by Frank Nuessel

[Review of Mazak, Catherine M. & Kevin S. Carroll, Eds. \(2016\) \*Translanguaging in higher education: Beyond monolingual ideologies\*](#)

Reviewed by Frank Nuessel

[Review of Hultgren, Anna Kristina, Frans Gregersen & Jacob Thøgersen, Eds. \(2014\) \*English in Nordic universities: Ideologies and practices\*](#)

Reviewed by Jouko Lindstedt

[Rassegna di Marazzini, Claudio & Alessio Petralli \(2015\) \*La lingua italiana e le lingue romanze di fronte agli anglicismi\*](#)

Recensione di Federico Gobbo

[Review of Coulmas, Florian \(2016\) \*Guardians of language: Twenty voices through history\*](#)

Reviewed by Probal Dasgupta

[Review of Peterson, David J. \(2015\) \*The art of language invention: From horse-lords to dark elves, the words behind the world-building\*](#)

Reviewed by Federico Gobbo

## 12 Esperantic Studies Foundation nomis novan Ĉefdirektoron

**1 junio 2017.** Esperantic Studies Foundation nomis Charles O. Mays kiel sian novan Ĉefdirektoron ekde la 1-a de julio 2017. Lia antaŭulo Joel Amis eksigis por kompletigi siajn magistrajn studojn pri religio, survoje al pastrigo en la Anglikana Eklezio de Kanado.

Laŭprofesie Chuck Mays estas elektra inĝeniero kaj projektogvidisto. Li diplomiĝis pri elektra inĝenierado ĉe la Nord-Karolina Ŝtata Universitato.

En la daŭro de sia kariero, li pasigis longajn periodojn eksterlande, inkluzive unu jaron en Honkongo kaj dek jarojn en Aŭstralio. Lige kun sia profesio, li vaste vojaĝis en Eŭropo kaj Azio kaj ankaŭ vizitis Sud-Amerikon kaj Afrikon.

Chuck jam kelkajn jarojn aktivas en la aferoj de ESF. Interalie, li aranĝis multjaran sidejon por NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro kiun ESF organizas ĉiujare, ĉe Universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Li elektiĝis kiel estrarano de la Fondaĵo en 2013.

“Ni estas ja feliĉaj, ke ni trovis tiel multflanke spertan homon por okupi la streĉan postenon de Ĉefdirektoro,” diris la prezidanto de ESF Humphrey Tonkin. “Nia laboro subtene al lingva interkompreniĝo kaj esplorado daŭre vastiĝas, kaj Chuck alportos la ĝustan kombinon de klarvido, internaciismo kaj administra kompetento por teni superrigardon de tiu procezo.”

“ESF estas konata pro sia investado en la estonteco de Esperanto kaj lingva justeco ĝenerale per faka esplorado kaj progresemaj projektoj kiel NASK, Lernu.net kaj Edukado.net,” Mays rimarkis. “Mi ĝojas havi la okazon kunlabori kun bonega estraro en la rolo de Ĉefdirektoro dum ESF daŭrigas subvenciadon de gravaj esploroj kaj valoraj programoj kaj eventoj.”

“Ni bedaŭras noti la finon de la servado de Joel Amis, almenaŭ en lia nuna rolo,” Tonkin komentis. “Joel helpis fortigi ESF kaj pretigis nin por la venonta paŝo. Ni deziras al li ĉiun sukceson en la venonta stadio de liaj studoj kaj kariero.”

“Estis granda privilegio labori por ESF,” aldonis Joel Amis. “La profunda engaĝiĝo kun multfaceta organizaĵo ligita al la Esperanto-komunumo kaj kun la universitata medio, min multflanke riĉigis. Kompreneble mi sentos la mankon de kunlaboro kun la talentaj, interesaj homoj en ESF – sed kvankam mia profesia kariero min gvidos laŭ alia vojo, mi daŭre restos entuziasma subtenanto kaj, laŭeble, kunlaboranto de ESF. Miajn plej sincerajn dankojn al ESF kaj la kolegoj ligitaj al ĝi, kaj miajn bondezirojn al Chuck Mays, en kies tre kapablajn manojn mi transdonas la administradon de la Fondaĵo.”

Per tiu nova enoficigo, la centro de agado de la Fondaĵo transiros el Montrealo, Kanado, al Raleigh, Nord-Karolino, Usono.

Havante estraron el Usono kaj Kanado kaj tutmondan konsilantaron, Esperantic Studies Foundation laboras por antaŭenigi la komprenon kaj praktikon de lingva justeco en multkultura mondo. Per siaj subvencioj kaj aliaj agadoj, la Fondaĵo celas evoluigi kaj subteni la plej altajn normojn en esploroj, edukado kaj interlingva komunikado.

[www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)

## 13 Londona konferenco diskutis la ekaperon de lingvopolitiko de Unuiĝintaj Nacioj

“La Lingvoj de Internaciismo” estis la temo de konferenco ĉe Birkbeck, Universitato de Londono, la 24-an ĝis 26-a de majo, organizita de la Projekto Reluctant Internationalists (Kontraŭvolaj Internaciistoj). La konferenco arigis interesan grupon de plejparte junaj historiistoj kaj aliaj fakuloj por trakti demandojn kiel ekzemple internaciajn planlingvojn, lingvon kaj ekspertizon en internaciaj organizaĵoj, kaj lingvouzon en internaciaj sociaj kaj politikaj movadoj. Inter la referaĵoj estis historio de la lingvopolitika evoluo de

Unuiĝintaj Nacioj de Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, Usono) kaj Lisa McEntee-Atalianis (Birkbeck, Universitato de Londono), kaj retrorigardo al la kresko kaj malkresko de Esperanto en Sovetunio prezentita de Brigid O’Keeffe, Brooklyn College, CUNY, Usono.

## 14 Interlingvistikaj Studoj en Poznano akceptas aliĝojn por 2017-2020

### **Aliĝu al la nova grupo de la unikaj Interlingvistikaj Studoj en Poznano por 2017-2020 kaj festu ilian 20-jariĝon kadre de la Kvara Interlingvistika Simpozio ĉi-septembre!**

Nur ĉiun trian jaron komencas siajn studojn nova grupo ĉe la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, kaj la sekva ebleco estos en septembro por la jaroj 2017-20. Unu el la plej prestiĝaj universitatoj en Pollando, UAM ofertas programon unikan en la tuta mondo: trijarajn eksterajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio, tute en Esperanto! La speciala programo estis aprobita antaŭ 20 jaroj, la unua grupo komencis siajn studojn en 1998, kaj la sesa grupo finos siajn studojn ĉi-septembre. Por marki tiujn okazos, speciala festo okazos dum la Kvara Interlingvistika Simpozio (21-22-a de septembro 2017), tuj post la interlingvistika sesio kaj antaŭ la tradicia kultura festivalo Arkones.

La Interlingvistikaj Studoj okazas en la Lingvistika Instituto de UAM, sub la gvido de la fondinto, prof. Ilona Koutny. Inter la prelegantoj de la Interlingvistikaj Studoj ĉiam estis kaj estas elstaraj esperantologoj (interalie, Duncan Charters, Renato Corsetti, Probal Dasgupta, Sabine Fiedler kaj Humphrey Tonkin, por nomi nur kelkajn). La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko por havi bazon por la studado de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto, ili fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio.

Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj de po kvar studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro), intertempe la gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj rete, en konsultiĝo kun la prelegantoj. La gestudentoj pretigas diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon de UAM pri la plenumo de Interlingvistikaj Studoj. Aliĝu ĝis la 15-a de aŭgusto 2017 por la la studjaroj 2017-2020, kaj informu ĉiujn, kiuj povas interesiĝi! La unua sesio okazos inter la 16-a kaj la 22-a de septembro 2017. Postuloj: baza diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto. Kotizo por unu semestro: 1850 PLN (ĉ. 460 EUR), reduktita 700 PLN (ĉirkaŭ 175 EUR) por B-landoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank’ al ESF.

Informoj kaj aliĝilo: <http://www.amu.edu.pl/~inter/>, kontakto: [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl) aŭ [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)

---

Eldonas Ipl: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Asya Pereltsvaig, Humphrey Tonkin kaj Yevgeniya Amis. Redakcio (kontribuioj, k.s.): [ipi@esperantic.org](mailto:ipi@esperantic.org). Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ipl riceveblas senpage de UEA.

---